

## **Programo de EDE (Stato en la 1a de decembro 2010)**

### **Homaj Rajtoj**

Nia tuta agado estas bazata sur la homaj rajtoj, kiel prezentitaj en la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj, kaj ni volas atingi la kompletan aplikon de la tuta deklaro en Eŭropo. Ni konsideras homajn rajtojn kiel kernon de la eŭropaj valoroj.

#### **\* Eŭropo**

- Ni estas *por* tio, ke oni rigardu al la nuna monda ekonomia krizo, kiel al ebleco kaj ne al problemo. Estas necese evoluigi novajn modelojn, kiuj centriĝas ĉirkaŭ la protekto de homoj kaj ne de financaj aŭ industriaj instancoj . La libera merkato, kiu montriĝis malkapabla, certigi stabilecon kaj dignan vivon por ĉiuj, devas esti korektata.

- Ni estas *por* tio, ke la eŭropa identeco ne estu konstruata per la detruo de la ekzistantaj identecoj sed per la libera aliĝo de la civitanoj al plia identeco.

- Ni estas *por* tio, ke Eŭropo alprenu komunan politikon kaj agadon en la kampo de konstruado de mult-kultura socio kaj de vastigado de la sociaj servoj ĝuataj en ĉiuj landoj de EU.

- Ni estas *por* daŭra konstruado de forta eŭropa politika unuiĝo, kiu okazu samtempe kun la plibonigo de la viv-kondiĉoj de la europaj civitanoj.

- Ni estas *por* tio, ke la produkto sistemoj en europaj landoj estu kiom eble plej respektaj al la natura medio tiel, ke normala vivo en Eŭropo estos ebla ankaŭ en la venontaj generacioj.

#### **\* Demokrateco**

- Ni estas *por* demokrata konstruo de Eŭropo, kies baza leĝo estu submetata al referendumo de ĉiuj eŭropaj civitanoj. Same pri aliaj temoj de tuteŭropa graveco referendumoj devas iĝi pli normalaj, por reaserti la fakton, ke en demokratiaj landoj la popolo decidas.

- Demokrateco antaŭpostulas liberan amas-komunikadon sendependan de politikaj kaj industriaj grupoj. Ni estas *por* ke Eŭropo subtenu liberajn amaskomunikilojn.

- Ni estas *por* rigora apliko de la principo de malcentra decidado kaj ni estas *kontraŭ* la nuna ne sufiĉa demokrateco, kiun civitanoj sentas rilate al Eŭropo.

#### **\* Esperanto kaj lingvaj rajtoj**

- Ni estas *por* la agnosko de la homaj lingvaj rajtoj de ĉiuj eŭropaj civitanoj tiel kiel difinas ilin pluraj dokumentoj de Unesko, alivorte ni estas *por* la uzo, ĝis la plej alta grado ebla, de ĉiuj lingvoj parolataj en la Unio. Ni estas *por* la uzo, kiam ne eblas uzi sian gepatran lingvon, de la internacia lingvo Esperanto, kio garantias lingvaj rajtojn je internacia nivelo.

- Lingvaj rajtoj devas esti agnoskataj al ĉiuj historiaj malplimulto kaj al ĉiuj novaj

malplimultoj en Eŭropo. Ni estas *por* politiko de integrado de ĉiuj novaj kaj malnovaj loĝantoj de Eŭropo, en la kadro de plurismaj socioj sed samtempe en la respekto de la homaj rajtoj de ĉiuj individuoj. Esence ni proponas la ekologian protektadon de la kultura ĉirkaŭaĵo, al kiu apartenas la protekto de lingva diverseco, samvalora kiel la diverseco de la naturo. La internacia lingvo Esperanto ĝuste utilas por tiu celo.

- Ni estas *kontraŭ* tia plurlingveco, kia ĝi estas praktikata nuntempe de la instancoj de la EU, ĉar ĝi praktike starigas unulingvecon per la angla kontraŭ ĉiuj eŭropaj internaciaj interkonsentoj. En tiu situacio, ĉiuj landoj, kies gepatra lingvo ne estas la angla, pagas lingvan imposton, kies avantaĝoj iras nur al kelkaj landoj kaj sociaj tavoloj. En situacio de ĝenerala instruado de Esperanto la lernejoj ŝparus grandegajn sumojn. La politiko de instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj de Eŭropo devas esti agordata al la bezono efektive instrui ankaŭ la lingvojn de la najbaraj popoloj.